

LA PACDEFENDANTO

N-o. 23. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO NOV. 1953.

„PACON SUR LA TERO!”

R. Burda

Tiel sonas la vortoj tra la landoj dum la legendaj tagoj de la naskiĝo de Jesuo Kristo la 24-26. de decembro. Sed la Moderna tempo devigas ankoraŭ aldoni: "kaj ankaŭ pacon sur la maroj kaj en la aero".

Dum tiuj ĉi tagoj la katolikaj, kristanaj kaj ankaŭ aliaj popoloj, eĉ ateistoj jam tradicie klopodas eviti malpaciĝon kaj emas vivi en kvieta paco unu apud la alia. Ja eĉ ofte okazis ke nek furiozanta batalo dum okazintaj militoj kapablis rezisti tiun ĉi tradicion. La soldatoj ĉesis la batalon dum daŭro de tiuj ĉi tagoj.

Kial ne povas tiu ĉi kelktaga pacemo sin etendi je monatoj kaj jaroj kaj eterne? Kial post ilia forpaso devas daŭrigi la malano kaj kruelaj bataloj? Ĉu ne la homoj estas stultaj, kiam laŭ komando de kelkaj militprofituloj kaj agresistoj ili sin reciproke torturas kaj murdas?

Ju pli progresema scienco de la mondo, des pli bestiala estas la konduto de ĝiaj loĝantoj. Ĉiu nova eltrovaĵo en la sciencoj kaj tekniko, kvankan destinata, por la bono de la homaro, ĝis nun nur servis al ĝia pereigo. Ĉu ne sufiĉe teruriga okazintaĵo demonstriĝis al ni en la regionoj de Hiroshima kaj Nagasaki, kiam unu sola atombombo kruele mortigis dum minuto centmilojn da senkulpaĵaj homoj kaj pluaj miloj ankoraŭ nun suferas difektitaj de ĝi? Ĉu vere ne eblas haltigi la sangantan manon de la militfrenezuloj kaj peli ilin al ĉiuj diabloj?

Dolori devus la konscienco al la homoj, kiuj malgraŭ tiaj spertoj dispone en tiu batalo por la defendo preparas novan ankoraŭ pli krudan hombuĉadon, kiuj nur pri sia profito kaj egoismo intencas denove kruele mortigi pacanajn homojn, virinojn kaj infanojn.

Nuntempe ĉiuj parolas laŭte pri la paco, sed des pli oni preparas novan militon. Ambaŭflanke temas nur pri defendo de la patrio kontraŭ eventualaj atakoj. - La bataloj en Koreio apenaŭ finiĝis kaj jam oni prepariĝas por nova ĝia daŭrigo. Japanio, kiu tiom multe suferis dum la lasta milito kaj apenaŭ eliris el la rekonvalescenco, opinias sin defendi pere de la militbazoj de la Usonanoj, kiuj al ili preparis Hiroshimon kaj Nagasaki. Laste oni uzis atombombon en Malproksima Oriento. Tre malmulton pri tiu okazintaĵo eksciis la eŭropaj nacioj, dank' al iliaj registaroj, kiuj ne deziras malkuraĝigi la defendemon de siaj popoloj.

Lastatenpe oni jam magazenigas atompafaĵojn en la centro de Eŭropo kaj precipe en la Okcident-Germana Respubliko. Dume oni parolas kaj vokas al traktado pri senarmigo pleniĝas antaŭ niaj okuloj la municiaj depotejoj per amasoj da hipermodernaj teruraj mortigiloj. La „Totala milito" de Hitler estis ludaĵo kompare

kun la milito, kiun oni preparas por la estonto.

La registaroj ne garantias al ni la defendon de la paco, la homoj mem devas preni ĝian defendon en siajn manojn, se ili ne volas atendi definitivan pereon de Eŭropo! Kaj nia tasko estas, doni ĉiujn fortojn kaj kapablecojn al de la paco kaj la savo de la homaro.

NOVA VENKO DE ESPERANTO

Laŭ informoj el "SAT-amikaro" la ministroj de Elzaso-Loreno decidis enkonduki en elementaj lernejoj instruadon de Espeanto por lernant oĵ kiuj ne deziras lerni la germanan lingvon. Tiu sukceso ne restis izolita. La instruaj instancoj de la urbo Strasburg ĵus elektis por la instruado "JUNUL-KURSON" kiel lerno-libron, kiun eldonis SAT, kio antaŭvidigas gravajn mendojn ĉe la SAT-Libro-Servo. Certe tio signifas novan sukceson sur la propaganda kampo de Esperanto. Tion ni ne raportas por igi vin flirti verdstelan Standardon ĉe via fenestro, sed por kuraĝigi vin al pli intensa agado por nia afero. La kamaradoj, kiuj faris la breĉon en la tri departementoj, montras al vi la sekvendan vojon. La instruistoj kaj profesoroj ĉerpu el tiu ekzemplo la necesan forton por strebi al sama enpenetrigo de Esperanto en diversajn lernejojn. Aranĝo de novaj kursoj montru la vivon de Esperanto kaj plivastigu la ĝis nun regionajn atingajojn!

Bazaj realigajoj estas nepra kondiĉo, por atingi la helpon de la superaj instancoj ĉi tiuj ne ŝatas, ke oni venu al ili kun malplenaj manoj.

ESPERANTO SUR LA PROGRAMO

S-roj Lefranc, deputito de Pas de Calais, Bilières, deputito de Hautes-Pyrénées. kaj pluraj iliaj kolegoj deponis proponon de rezolucio celanta instigi la registaron:

1/ enkonduki la lingvon /Esperanto) en la programon de la publika instruado.

2/ proponi tiun lingvon al "UNO" kaj al Eŭropa Konsultenda Kunveno kiel lingvon de universala interkomunikado.

El: Franc-Tireur (30. 10.53)

27a SAT-KONGRESO EN NANCI

La venonta 27a kongseso de SAT okazos la 31. de julio ĝis 6. de aŭgusto en Nanci (francio). Dank' al la francaj k-doj, kiuj jam nun garantias prizorgon de kolektivaj loĝejoj kaj komunaj manĝejoj ebligos eĉ al malriĉaj gek-doj la partopreno. Bela kongresmarko, tri folioj por 50.-fr. fr. estas aĉetebla ĉe SAT-Libroservo 67 avenue Gambetta, Paris 20a, Francio.

PREPARIĜAS LA MACUKAVA PROGRESO

Jam antaŭ jaroj hazarde okazis akcidento. Apud Macukava (Japanio) elrelevis vagonaro. Ĉirkaŭ tiu ĉi tempo ĵus alvokis la sindikato la laboristaron al defendo de siaj rajtoj. Tion misuzis la reakciaj elementoj por akuzi kelkdekan da aktivaj funkciuloj pro la okazo de la akcidento. Dum jaroj senkulpaj kaj honestaj homoj jam suferas en karceroj. Dum jaro patrinoj kaj infanoj vane atendas revenon de siaj patroj. Kelkfoje la reakciaj juĝistoj jam provis aranĝi la juĝproceson kun la senkulpe akuzitaj

bravaj batalantoj, sed ĉiam amaso da pratestoj kaj avertoj el la tuta mondo kaj el Japanio mem, prokrastigis la komencon de la proceso. Grave kontribuis ankaŭ la manko de necesa akuz-materialo, ĉar ĉiuj akuzitoj argumentis kie ili troviĝis en la tempo, kiam la akcidento okazigis.

Nun denove oni kuraĝis anonci la komencon de de la proceso je la 22. decembro 1953. Do tute antaŭ la festo de Kristnasko, kiam ĉiuj homoj emas al paco, la japana reakcio intencas semi malamon kaj teruron. Necesas averti la respondeculojn antaŭ la efektivigo de tiu ĉi krimo! Denove fluu po miloj la protestleteroj, al la juĝejo kaj al la registaro en Tokio por postuli liberecon al ĉiuj akuzitoj! Jam ĉiuj ĉsl. gazetoj antaŭtempe raportis pri tiu ĉi intencita krimago inkluzive la partia organo RUDÉ PRÁVO. Nun necesas denove vekti la konsciencan de ĉiuj pacamaj homoj! Atentigu viajn organizojn pri akuta danĝero, kiu minacas al iliaj japanaj kamaradoj, instigu ilin sendi protestleterojn k. telegramojn pere de Nippon Kokumin Kyuen-Kai, (Lab. kamparana Solidareco) 12. Shinbashi 7-Chome, Minato-ku, TOKIO, Japanio.

BONVOLU AL NI PARDONI

la daŭran prokraston en la liverado de julia-aŭgusta, sept. kaj oktobra n-oj. La kulpo estas ĉe k-do Mohapl-Olomouc (nia nova eldonejo), kiu malbone funkcias. Ĉi n-on ni devis aparte pagi, por povi al vi almenaŭ ion liveri.

NIA MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKIO

NOVÝ BOR, nova kurso aranĝita de la uzina klubo "Borské Sklo" kiun vizitas 18 gelernantoj, komencis la 15. de okt. en la Kultura domo de Nový Bor. Instruas k-do Rich. Wenzel. Nia tasko estas, sur bazo socialisma disvastigi Esperanton kiel mond-helplingvon por fratiigi la proletojn en la tuta mondo kaj tielmaniere kontribui por la mondpaco. E.D.

OSTRAVA, la uzina klubo de VŽKG havas nun 90 anojn. Funkcias kursoj por komencantoj kaj progresintoj ĉiu merkrede, regule vizitataj de 15-25 lernantoj. Inter ili 12 lernejinferoj.

OLOMOUC, la 5. de nov. vizitis nian rondeton k-do. R. Burda el Plzeň, kiu informis en improvizita kunveno pli ol gek-dojn pri la en- kaj eksterlanda situacio de Esperanto. La rondeto invitas ĉiujn gek-dojn al komuna festvespero, kiu okazos dimanĉe la 6. 12. 1953 en la klubejo Masarykovo nám. 25, II. etaĝo. La 31. de okt. (festotago de mortintoj) esperantista delegacio metis flor-kronojn kun verda stelo sur ĉiujn tombojn de la mortaj gek-doj en la urba tombejo.

DOLNÍ SUCHA, la Esp-rondeto de la uzina sindikata klubo de la minejo, "Dukla" sukcesis eldoni sur bela papero en presejo fabrikitan informan flugfolion pri speranto. Ĝi estas nacilingva, uzebla en ĉiu loko. Necesas nur aldoni stampon de la loka informejo. 1 peco 0.20 Kčs. Mendu ĉe supra adreso kaj aldonu poŝtmarkon por

respondo.

PLZEŇ, la 18. de nov. komencis kurso kun 8 komencantoj. Nia Burda estis elektita kiel presidanto de la Mondpaca Esperantista Movado, kiu fondiĝis en St. Pölten. Merkrede, la 16. de decembro okazos membra kunveno samtempe kun solena Zamenhof-vespero en la gastejo "U Fišerů" Plzeň, Sedláčkova ul. 39. Komenco de la 19a horo.

PŘEROV, dum somero ni aranĝis oftajn komunajn ekskursojn dimanĉe. La 6.10. komenciĝis kurso kun 30 lernantoj. Por la vintra sezono ni preparas prelegojn de partoprenintoj el internaciaj Esperanto-kongresoj kun lumbildoj.

OSTRAVA-ZÁBŘEH, la Esp.-rondeto de J. A. Komenský aranĝis amuzan vesperon kaj per abunda programo prezentita ĉefe de la junul-aro bone amuziĝis la nombra ĉeestantaro. Antaŭ la fino parolis k-do. F. Lička pri la sukcesoj de la en- kaj eksterlanda Esperanto-movado. 6 Esp.-rondetoj de la distrikto decidis aranĝi regulan komunan kunvenon ĉiun unuan lundon en la monato de la 19 . h. en la Domo de tramistoj por interkonatiĝo de esp-istoj kaj plifortigo de la loka E-movado. La uzina klubo de VŽKG okazigis ĝeneralan kunvenon. Por la nova komitato oni elektis K-don F. Lička presidanto, Magera-sekretar. kaj Plaček-kasista.

KOPŘIVNICE, post komuna interkonsilo, kiun partoprenis k-do Mohapl el Olomouc, k-do. Zanáška kaj k-dino. Hřčková el Kopřivnice kaj k-do R. Burda el Plzeň kaj estis decidite eldonadi nian cirkuleron L.P. komence de januaro 1954 pere de la Esp.-rondeto de la uzina klubo TATRA en Kopřivnice . La redakcio restos en Plzeň.

PŘÍBOR, la loka esp-rondeto decidis kun konsento de la regiona kunveno translokigi la jam tradicia Someran Esperanto Kolegion, kiu ĝis nun okazis en Rožnov p. R. ek de la jaro 1954 al urbo Příbor.

OPAVA, la lokaj esperantistoj invitis al sia klubejo ministron d-ron Al. Neumann, kiu prelegis en Oprava pri sia vizito en Popola Ĉinio kaj informis lin pri la agado de la esperantistoj. La 8. de oktobro komencis kurso kun 30 komencantoj.

LANŠKROUN, la Esp.-rondeto aranĝos en la Domo de kulturo en Lanškroun la 13-20 decembro Esperanto-seminarion kun jena programo:

13/12 – J. Kořínek: Esp-o kaj poezio;

14/12 – J. Vondroušek: Literaturo en Esperanto.

15/12 – J. Werner: Nia mov. en lumbild.

16/12 – " : Kion Esp. jam atingis

17/12-18/12 : Ekzempl. de kursoj

19/12 – prof. J. Kožený: Marksismo en la lingvistiko kaj Esperanto

19-20/12 R. Hromada kaj D-ro Kamarýt pri signifo kaj valoro de Esperanto

ĈU VI ŜATAS INGORMOJN EL ALIAJ LOKOJ? DO NE FORGESU VENONTE
RAPORTI ANKAŬ EL VIA LOKO !!!

LA KUNSIDO DE LA MONDPACKONSILANTARO

De la 23-28 novembro denove kunvenis la landaj delegitoj de la Monda Packonsilantaro en Vieno (Aŭstrio) por pritrakti aktualajn problemojn koncerne la garantio de la mondpaco. Dum sia malferma paralado la 23/11. parolinte pri la solidareco inter la nacioj, kiu sola povas garanti la venkon, diris profesoro Jolliot CURIE, la presidanto de la Monda Packonsilantaro inter aliaj jenajn vortojn:

"Ni kunlaboris - kaj ankaŭ plue kunlaboros kun ĉiuj organizitaj fortoj, kiuj laboras por la paco! Necesas, ke ni nian agadon ankoraŭ plivastigu. La viva graveco de la problemoj, pri kiuj temas, postulas, ke ni eniru la batalon ne disigitaj." Tio signifas, ke ankaŭ la esperantistaj pacdefendantoj el ĉiuj landoj ekpaŝu por aligi sin kiel bone organizita forto al kunlaboro por la paco!

PACPROPAGANDA LETERPAPERERO

Jam troviĝas en la presejo mendo de leterpapiro kaj kovriloj kun verda surskribo "PER ESPERANTO POR LA MONDPACO" kaj packolombo pentr. de Pikas. Paperformato: 210x300 cm. Verŝajna prezo por 50 ekz. estos 10.- Kĉs aŭ 10 int. resp. kuponoj. Mendu ĉe k-do Jos. REISER, Krajská správa spojů, Tyllova ul. PLZEN, ĈSR.

MUNICIO POR NIA Batalo

Esp. rondeto "Dŭl 1. máje", k-do Kubasiák – KARVINÁ, ... 4 Kĉs
Esp. rond. k-do Kavka, DUCHCOV 4,- Kĉs
Esp. rondeto – ZÁLUŽÍ, k-dino. Králová, Litvínov. . . 4, - Kĉs
Kiuj gek-doj venonte liveros al ni pluan municion por na batalo?
NE FORGESU RENOVIGI JARABONON!

KORESPONDI DEZIRAS:

K-dino Lauber Erzsébet, Oiós-dŭlő 12, PÉCS, Hungario (14jara) pri ĉiuj temoj kun ĉiuj landoj.

k-do Rodrigo GIUSMAO, Rua Torinho, 154-156, PORTO, Portugalio, ĉefe pri popolaj kutimoj, kulturaj kaj klerigaj temoj.

La Haaga Katolika Esperanto Unuiĝo aranĝos en januaro letervesperon. Bonvolu sendi salutojn al: Laan van N. O. Indie 229, DEN HAAG, Nederlando. Ni certe respondos al ĉiu.

K-do Stuart KITTEREDGE, 757 Maple A Hatford 6, CONN, USA. Ĉiu, kiu sendos salutojn aŭ propag. materialon okaze de nia Zamenhoffesto ricevos certan respondon.

Salutleterojn kaj il. p. k. sendu al Brazilia Esperanto Kongreso (okazonta la 7-14. de jan. 1954) Str. Riachuelo 285, CURITIBA (Paraná) Brazilio. Ĉiu ricevos kongresmemorajon.

S-ro John Q. RICHLY, 2667-17 Str. Sacramento 18, Californio, USA, interŝanĝas bildkartojn.

S-ro Frode W. Hansen, Mariagervej 23, RANDERS, Danlando, kun inoj el ĉiuj landoj per il. p. k.

S-o. Nally van PUTTEN, AV. Atlantica 3150 ap. 102, Copacabana, RIO DE JANEIRO, Brazilio, kun ĵurnalistoj, kiuj dez. interŝanĝas artikolojn pri soc. kaj politik. problemoj.

K-do. Felix ONDERKA, P.S. 30/A. RUŽOMBEROK, Slov. Ĉeĥoslovakio (20 j.) kun ĉiuj landoj speciale kun DDR

K-dino Lilian KRUIT (10jara) Vier Heemskinderenstr. 53, AMSTERDAM W., Nederlando, kun infanoj pri il.p.k.

K-dino, Cilia BROWER (13jara) Louise de Colignystraat 10/III, AMSTERDAM, Nederlando, kun infanoj per il. poŝtkartoj.

1 anonco kostas 2.- Kĉs aŭ 2 res.kup.

Eldonas : OSVĚTOVÁ BESEDA, - odb. esperantistů "KOMENSKÝ" OSTRAVA-Zábř.

Rdaktas: K-do Rudolf BURDA, Palackého náměstí č. 6, en P L Z E Ň

Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O
